Bonvenon al nia promenado!

Loveno ricevis la titolon "urbo" en la jaro 1211. Komence de 2023 la urbo havis 103 000 loĝantojn. Loveno situas ĉe la rivero Dejlo kaj estiĝis grava centro de negoco en la 11-a jarcento. Ĝi restis tia ĝis la 14-a jarcento. Loveno estis ekzemple grava centro por la produktado de drapo. En la 15-a jarcento nova orepoko ekis kun la fondo de la plej granda kaj plej malnova universitato de la Malaltaj Landoj: Katolika Universitato de Loveno. En la 18-a jarcento Loveno estiĝis eĉ pli grava pro prospera bierfarejo, kaj la konstruo de kanalo al Meĥleno.

**Itinero de nia promenado: kelkaj priskriboj**

La **Granda Placo** (nederlande: Grote Markt) situas je unu el la plej historiaj lokoj de Loveno kaj estis en sia nuntempa aspekto ekde la 14-a jarcento, kun la fondado de la Katolika Universitato de Loveno. La plej multaj el la konstruaĵoj de la placo estas tiel kreitaj laŭ la fama brabanta gotiko, kiel ekzemple la monumenta urbodomo. Temas pri limŝtona konstruaĵo konstruita en brabanta malfrua gotika stilo inter 1448 kaj 1469. Ĝi estas fama pro sia ornamita arkitekturo, kreita per punto-similaj detaloj. Aliaj okulfrapaj konstruaĵoj sur la Granda Placo estas la **Ronda Tablo** (nederlande: Tafelrond) kaj la **Preĝejo de Sankta Petro** (nederlande: Sint-Pieterskerk).

En la **Parko de Sankta Donato** (nederlande: Sint-Donatus Park) estas restaĵoj de la unua muro ĉirkaŭ la urbo Loveno el la 12-a jarcento. Temas pri mur-fragmento kaj du turoj, faritaj el grejso kaj fera grejso.

La unuaj remparoj de Loveno troviĝas ĉe **turo Jansenius** kaj datiĝas de la komenco de la 13-a jarcento. Tradicie oni supozis, ke la konstruado de la muro okazis en la mezo de la 12-a jarcento, pli specife de la periodo 1156-1165, sed lastatempaj esploroj montris ke tiu datigo estas tro frua. Armeaj arkitekturaj trajtoj (flankaj turoj, paffendoj, parapetoj sur arkoj) indikas konstruon en la frua 13-a jarcento, sekvante la ekzemplon de la tiel nomita "système philippien". La iniciatinto por la konstruado de la urbomuro estis verŝajne duko Henriko la 1-a (1190-1235).

La **Preĝejo Predikheren** estas la plej malnova gotika preĝejo en Loveno. Ĝi ankaŭ estis unu el la unuaj gotikaj preĝejoj en Belgio. La konstruaĵo ne plu estas utiligita kiel preĝejo. Tiu loko estis donacita fare de la Dukoj de Brabanto al la dominikanoj, kiuj ekloĝis en Loveno en 1228. La preĝejo estis origine la monaĥeja preĝejo de la dominikanoj, ankaŭ konata kiel Predikistoj, tial la nomo de la eklezio. Konstruado de la preĝejo komenciĝis en 1234. La unua fazo de konstruado finiĝis ĉirkaŭ 1275.

**Vortlisto**
Ni pretigis por vi etan trilingvan vortliston; vidu la dorsan flankon. Ne temas pri listo de fakvortoj aŭ io tia, sed simple pri alfabeta listo de vortoj kiujn nia ĉiĉerono eble uzos dum la promenado. Bonan malkovradon… kaj lernadon!

| Nederlanda | Esperanto | Franca |
|---|---|---|
| baksteen | briko | brique |
| bisschop | episkopo | évêque |
| classicisme | klasikismo | classicisme |
| deerne | junulino (arkaika formo) | Jeune fille (archaique) |
| Dijle | Dejlo | Dyle |
| drooglegging | senakvigo | assèchement |
| edelsmeedwerk | artforĝaĵo | orfèvrerie |
| erfgoed | heredaĵo | patrimoine |
| gietijzer | giso | fonte |
| glasraam | vitralo | vitrail |
| Gotisch | gotika | gothique |
| gracht | fosaĵo | fossé |
| herenhuis | mastra domo | maison de maître |
| hertog | duko | duc |
| ijzerzandsteen | fera grejso | grès de fer |
| kalkzandsteen | kalka grejso | grès calcaire |
| klooster | monaĥejo | couvent |
| kruisvaarder | krucmilitisto | croisé |
| lakennijverheid | drapo-industrio | industrie textile |
| middeleeuwen | mezepoko | Moyen Âge |
| muziekkiosk | muzika kiosko | kiosque à musique |
| omwalling | remparo | rempart |
| restanten | restaĵoj | restants |
| ridder | kavaliro | chevalier |
| ringmuur | ringa muro | mur d'enceinte |
| rozenkrans | rozario | chapelet |
| sluis | kluzo | écluse |
| stadhuis | urbodomo | hôtel de ville |
| toegangspoort | pordego | porte d'entrée |
| tol | vojimposto | péage |
| waltoren | remparoturo | tour de rempart |
| watertoren | akvoturo | château d'eau |
| zandsteen | grejso | grès |